

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 43-44 (302-303)

Julho-Agosto 1941

Redator responsavel:
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:
Praça da República, 54.
Rio-de-Janeiro, Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondekuponoj.

STATISTIKO KAJ ESPERANTO

Kiel ni diris en nia lasta numero, sekve de la Rezolucio n.º 82, de la 18a de Julio 1938a, per kiu la BRAZILA INSTITUTO DE GEOGRAFIO KAJ STATISTIKO akceptis Esperanton kiel helplingvon, la Konsilantaro de Statistiko, unu el la du divizioj de la Instituto, en ĝenerala kunveno, aprobis la Rezolucion n.º 128, kiu starigis, ke la lernado de Esperanto estas deviga instrutemo de la teori-praktika kurso ĉiujare farata de la Instituto por la praktikantoj de la Ŝtataj statistik-servoj.

La duan de Julio, ĉe la salono de la INSTITUTO okazis la solena malfermo de la unua Perfektiĝa Kurso. Prezidis la kunsidon d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto, reprezentanta ties prezidanton, Ambasadaron José Carlos de Macedo Soares, kiu ne povis ĝin ĉeesti. Faris interesan paroladon pri la nuna stato de Statistiko en Brazilo kaj eksterlande d-ro Wilson Soares, unu el la instruantoj de la kurso. Ferman-te la kunsidon d-ro Teixeira de Freitas prezentis al la ĉeestantaro la instruantojn kaj asistantojn kaj per entuziasmaj vortoj montris la utilon de la internacia helplingvo Esperanto por la statistikaj servoj.

La perfektiĝa kurso konsistas el tri lernobjektoj, nome: *Teoria Statistiko* — (instruanto — prof. Lauro Sodré Viveiros de Castro kaj asistanto — s-ro Ariosto Pacheco de Assis), *Aplika Statistiko* — (instruanto — prof. Wilson Soares kaj asistanto — d-ro Germano Jardim) kaj *Esperanto* —

(instruanto — ing. Alberto Couto Fernandes kaj asistanto — d-ro Mario Ritter Nunes).

La lecionoj okazas ĉiutage kaj daŭros ĝis la 30a de Aŭgusto nunjara.



S-ro Ambasadoro d-ro José Carlos de Macedo Soares, prezidanto de la "Brazilo Instituto de Geografio kaj Statistiko" kaj eksministro por Eksterlandaj Aferoj.

Enskribiĝis en la kurson 55 gelernantoj, el kiuj 23 estas praktikantoj de la Ŝtataj statistik-servoj, al kiuj estas speciale destinita la kurso, 10 estas geoficistoj de la Ĝenerala Sekretariejo

de la Instituto, 14 estas geoficistoj de la Statistika Servo de la Ministrejo por Edukado kaj Saneco, du komunumaj geoficistoj, unu sendita de la Milita Stabo, unu el la Homsumiga Komisiono, unu el la Instituto de la Bankoficistoj kaj tri gestudentoj.

Jen la nomoj kaj Ŝtatoj de 21 gepraktikantoj: F-inoj Linda Dau (*Amazonas*), Osmarina Iracema Mesquita (*Pará*), Alba Brandão (*Rio-Grande-do-Norte*), Maria dos Passos Bastos (*Rio-de-Janeiro*), kaj s-roj José de Souza Barreto (*Maranhão*), Francisco Mendes Medeiros (*Ceará*), Joffre Borges de Albuquerque (*Paraíba*), Aulete Luiz de França Caldas (*Pernambuco*), Edgar de Souza Machado kaj Renato de Mendonça Canuto (*Alagoas*), José Cruz (*Sergipe*), Antônio Loureiro de Souza (*Baía*), Raul Sodré (*Espírito Santo*), Manoel Dutra Rodrigues Perdigão (*São Paulo*), João Oswaldo Fonseca (*Paraná*), Ivo Maes kaj Antonio de Pádua Pereira (*Santa Catarina*), Elí Ruiz Caravantes (*Rio-Grande-do-Sul*), Benedito Lourenço Dias (*Goiás*), kaj João Dias Pereira Gomes (*Minas Gerais*). La du aliaj estas s-ro Said Abraham Faraht, kiu venis el *Território Acre* kaj s-ro Antônio Carneiro da Silva, kiu estas oficisto de la Statistika Departemento de la Magistrato de *Rio-de-Janeiro*, ĉefurbo de Brazilo.

La trian de Julio la instruanto de Esperanto, s-ro A. Couto Fernandes, donis sian unuan lecionon, kiu konsistis el parolado pri la jena temo: "Esperanto kiel internacia helplingvo

serve de la homa frateco. Historio de la Esperanto-movado en Brazilo. Ĝia eduka valoro kaj la praktikaj utiloj ĉe la elmontra statistiko. La uzo de Esperanto ĉe la Oficiala Brazila Statistiko”.

La 15an de la sama monato la nordamerikaj geesperantistoj s-ro George A. Connor kaj f-ino Doris Tappan vizitis la Instituton kaj diris kelkajn salutajn vortojn al tiuj gelernantoj, kiuj elmontris grandan ĝojon pro tio, ke ili bone komprenis la gevizitantojn. Tiam oni faris belan fotografajon, kiu ilustras nian bultenon.

Brazila Ligo Esperantista kaj s-roj A. Couto Fernandes, H. Mota Mendes kaj Ismael Gomes Braga donacis al la lernantaro ekzemplerojn de la jenaj lernolibroj de ili eldonitaj: Exercícios de Esperanto, Gramática Elementar de Esperanto, Vocabulário Esperanto-Português kaj Primeiro Manual de Esperanto. La aĉetintoj de la “Dicionário Português-Esperanto” ricevis rabaton de 60%.



D-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la “Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko” kaj honora membro de “Brazila Klubo Esperanto”.

Al la lernantaro estas disdonataj multobligitaj folioj kun ekzercoj, kiujn preparis la instruanto kaj la asistanto, d-ro Mario Ritter Nunes, kaj maŝinskribis f-ino Maria da Luz Costa, lernantino de la kurso kaj oficistino ĉe la Ĝenerala Sekretariejo de la Instituto.

Ne estas necese reliefigi la altvaloran gravecon de tiu kurso. Ĉar ĝi estas ne nur oficiala kaj deviga — kaj tial la lernantoj devas ĝin elfini —, sed ankaŭ ĉiujara, ĝi varbos ĉiujare al la Esperanto-movado aron da novaj samideanoj, kiuj certe multe helpos la propagandon de la helplingvo, precipe en la ŝtatoj!

Publikigante en la kolonoj de nia revuo la portretojn de la bonfarintoj de Esperanto Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares kaj d-ro Mario Teixeira de Freitas, respektive, prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la “Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko”, ni elmontras la dankemon de la brazila esperantistaro.

ĈE LA “BRAZILA INSTITUTO DE GEOGRAFIO KAJ STATISTIKO”



Grupo de gelernantoj de la Perfektiĝa Kurso nun farata de la “Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko” por la praktikantoj de la ŝtataj statistikservoj, kies unu el ĝiaj instrutemoj estas Esperanto, fotografita okaze de la vizito farita al la Instituto de la nordamerikaj gesamideanoj s-ro George A. Connor kaj f-ino Doris Tappan. Krom la gelernantoj vidiĝas sidantaj de maldekstre dekstren la jenaj personoj: D-ro Germano Jardim, sekciestro ĉe la Instituto kaj asistanto de la kurso; d-ro Leomax Falcão, direktoro de la Statistika Departamento en ŝtato Paraíba; d-ro Manuel Diegues Junior, direktoro de la Departamento de Statistiko en ŝtato Espírito Santo; d-ro Alberto Martins, direktoro de la Ĝenerala Sekretariejo de la Instituto; f-ino Doris Tappan, usona instruistino de Esperanto; inĝ. A. Couto Fernandes, instruanto de Esperanto; gesejnoroj d-ro Benjamin Camozato, d-ro Waldemar Lopes, sekciestro ĉe la Ĝenerala Sekretariejo de la Instituto, kaj d-ro Mario Ritter Nunes, asistanto de la katedro de Esperanto. Starante post d-ro Germano Jardim estas s-ro Ariosto Pacheco de Assis, asistanto de la kurso.

La brazila NACIA HIMNO

De Ipirang' la mildaj bordoj aŭdis, jen,
 ehoan krion de heroa gento,
 kaj de l' liber' la sunradioj brilis tuj
 de la Patrujo sur la firmamento.

Do se ni de l' egaleco
 garantion konkeris per brako forta,
 en la sin' de l' libereco
 nia brust' defias eĉ je frapo morta.

Patruj' amata,
 adorata,
 vivu! vivu!

Brazil', intensa sonĝo kaj radi' de am'
 kaj de esper' descendas al la tero,
 se brilas de la Suda Kruc' la bela bild'
 en via milda purĉiel-etero.

Giganta per la propra naturfonto,
 koloso forta estas vi, sentima,
 graudecon vian montras ja l' estonto.

Land' adorata,
 ĉe l' landoj mil,
 Estas Brazil'
 Patruj' amata!

Vin servi volas ĉiu via fil',
 Land' amata,
 Brazil'.

Eterne en riĉega lit' kuŝante vi,
 ĉe l' son' de l' mar' kaj alta lum' ĉiela,
 Brazil', sub sunradioj de la Nova Mond'
 brilegas, Amerika perlo bela!

Ol bellandoj ajn aliaj
 havas viaj plaĉaj kampoj pli da floroj,
 pli da viv' arbaroj niaj,
 nia vivo pli da amo en la koroj.

Patruj' amata,
 adorata,
 vivu! vivu!

Brazil', simbolo estu de eterna am'
 steloza via flago kvarkolora;
 la verdo-flavo de l' standardo diru ja:
 Pac' en estonto, la pasinto glora!

Sed se per justa glav' vi diras vorton,
 ne ruĝos viaj filoj for de l' lukto
 kaj vin amante, ne timos la morton.

Land' adorata,
 ĉe l' landoj mil,
 Estas Brazil'
 Patruj' amata. Vin servi volas ĉiu via fil',
 land' amata, Brazil'.

DIAJ LARMOJ

"Fiat lux!" estis vortoj de l' Sinjoro
 Ĉe la kreo de l' Mondo tiel bela;
 Kaj ekestis la Tago, lum' ĉiela,
 Disradiana kiel orpolvero.

Naskiĝis Vivo — paradiza floro
 Kun ebria parfum' tra spaco stela.
 Sajnis la Mondo revo nur fabela,
 Kaj Li diris: "Ekĝojas mia koro!"

Kantis la birdoj... Fluis la riveroj...
 Ridis la verdaj kampoj... Kaj vinberoj
 Proponis sin el la unua sem'.

Fine — kreita Homo "super ĉio"...
 Ho malbeninda! Baldaŭ ploras Dio
 Pro la sendanka Sia bildo mem!

Porto Carreiro Neto.

Rio-de-Janeiro, 19-7-1936.

LA FAMILIO ZAMENHOF

En la numero de *O Brasil Esperantista*, Januaro-Februaro 1941, estis artikolo, kiu raportis la morton de F-ino Lidja Zamenhof, kaj nekrologo. Sajne oni ĉerpis la informon el Brazila ĵurnalo *Correio da Manhã* de la 4a de Januaro, kiu raportis, ke ŝi mortis en malliberejo.

Feliĉe ni povas raportti, ke tiu informo estas erara. Laŭ nia informo F-ino Lidja neniam estis en malliberejo, kaj ni havas antaŭ niaj okuloj kopion de letero skribita de ŝi al samideano je la 7a de Januaro, do kelkajn tagojn post la dato de ŝia supozita morto. Certe la Esperantistaro estos tre kontenta havi tiun novaĵon.

Plue, ni povas aldoni, ke en Januaro D-rino Sofio, S-ino Wanda, kaj S-ro Ludwig (filo de D-ro Adam) Zamenhof estis en Varsovio, loĝantaj en la juda kvartalo, kaj ŝajne ĉiuj sanaj. Pri D-ro Adam estas nenia novaĵo.

El la mono kolektita por helpi la familion ni sukcesis sendi malgrandan sumon al filo de Felix Zamenhof. Ne estas ebleco nuntempe helpi al la aliaj familianoj. Ni, do, konservas la monon por helpi al ili restarigi pli kontentigan vivon post la fino de la milito; sendube ili tiam bezonos nian helpon.

C.C.G.

TUTAMERIKANISMO

Ofte ambasadoj de l' bona volo en nia Nova Mondo amike vizitas la landojn por plifirmigi la reciprokan estimon inter la amerikaj popoloj, kaj bone ili trafas sian celon... Gentile ili ridetas al ni kaj ni al ili; ili alparolas nin fremde kaj ni ne kromprenas, sed reciproke ni alparolas al ili ĝentilajn frazojn en nia klarega nacia lingvo, kiun bedaŭrinde ili ankaŭ ne komprenas. Ili faras belajn paroladojn en sia propra kaj ni en nia lingvo. Festenoj, floro, ĝojo, fotoj en la gazetoj, promenadoj en grupoj, kie

kam skribe ili havas kelkajn vortojn parencajn: *science*, kiun ili legas *sá-jens*, sed ni diras "sĵensja"; "case" por ili sonas *kejs*, sed ni diras *kázu*; *obliged* ili legas *oblaĵget*, sed ni *obrigado*, ktp. senfine.

Kelkfoje oni trovas kungaran interpretiston, kiu en sama grado kripligas ambaŭ lingvojn kaj pensigas en egala grado al ni kaj ili, ke la nivelo de nia inteligenteco estas ja tre mizera! Estas naŭva utopio esperi, ke la usonanoj lernos sufiĉe nian lingvon aŭ ni ilian. Ambaŭ lingvoj es-

Fraŭlino Doris E. Tappan havas sincerajn amikinojn en niaj familioj; ŝia vizito estas vera kaj sincera ĝojo en niaj hejmoj. Niaj junulinoj tre ĝojas promenadi kun ŝi. Kian misteran povon havas la lingvo! Ĉu per naciaj lingvoj tiu ĉarma fraŭlino povus same amikiĝi kun brazilaj fraŭlinoj? Kvankam ŝi estas tre ĉarma persono, certe se ŝi ne sciis Esperanton, ŝi devus esti "fremdulino" ĉe ni tute egale ĉu ni interparolus angle aŭ portugale, ĉar ambaŭ lingvoj estas timinde malfacilaj por alilingvano.

S-ro George A. Connor diskutas la plej kompleksajn problemojn kun ni ĉiuj kaj ĉiam ni trovas agrablajn solvojn, ĉar ni vere nin reciproke komprenas sur perfekte egalrajta kampo, sur tute neŭtrala lingva fundamento.

Do nun Usono sendis al ni la plej trafajn ambasadorojn de la bona volo! Ni gratulas nin mem kaj la grandan Nordan Respublikon. Per Esperanto ni povos vere kaj perfekte atingi la revon de la plej harmonia tutamerikanismo en la vivo, ne nur surpapere!

Niaj karaj vizitantoj jam de kvar semajnoj estas vere en Brazilo, ne nur en usonaj rondoj loĝantaj en Rio. Ili telefonas al ni, ili vizitas nin, ili promenadas kun ni, ili vivas nian vivon. Kiom da alilandanoj loĝas en Rio dum tutaj jardekoj, sed restas ĉiam fremdaj en nia lando, ĉar ili vere nenion scias pri ni! Kvankam ilia korpo estas en Brazilo, ilian animon ni ne konas, ĝi estas fermita al ni same kiel la nia al ili.

El tuta koro ni salutas niajn karajn vizitantojn kaj petas, ke ili diru al ĉiu usonano kiel ni promesas diri al ĉiuj brazilanoj: "Se vi vere deziras tutamerikanismon, lernu Esperanton!" Sen neŭtrala lingvo interamerika, tutamerikanismo restus simpla utopio!



Parolado por Esperanto farita de S-ro George A. Connor sur la ŝipo "Uruguay", dum sia vojaĝo al Rio-de-Janeiro.

la vizitantoj parolas al siaj propraj samlandanoj, kaj niaj grupoj ankaŭ vigle parolas en nia propra lingvo. Ĉio tre bela! Bedaŭrinde nur estas, ke la vizitantoj konatiĝas nur kun montoj, urboj, ridetoj, sed nenion ili lernas pri nia inteligenteco. Eminentata universitata profesoro aŭ simpla kelnero, ŝajnas al ili tute egalaj homoj...

Antaŭ kelkaj jaroj venis el Usono tuta milo da eminentaj ĝeinstruistoj. Grandega ŝipo restis kiel ilia hotelego. Ili vizitis lernejojn, teatrojn, muzeojn, kaj grupoj de niaj propraj ĝeinstruistoj gvidis ilin en la vizitadoj. Ĉie grupoj de maljunaj eminentuloj vigle parolis, la brazilanoj inter si, la usonanoj ankaŭ inter si. Ĉu ili aŭ ni estas malkleraj? Tute ne! Ĉiuj estas tre inteligentaj kaj instruitaj homoj, sed bedaŭrinde ili parolas angle kaj ni portugale, kaj tiuj du lingvoj estas malsimilegaj en konversacio, kvan-

tas tre malfacilaj. La nia ĉefe pro senfinaj gramatikaj komplikaĵoj kaj ilia pro la malfonetika skribmaniero. Vere ekzistas du anglaj lingvoj: unu por skribi kaj la alia por paroli. Se vi deziras bone paroli, ne lernu la skriban lingvon, evitu ĝin, ĉar ĝi nur povas erarigi vin.

Nun kun ĝojo ni ricevas vere trafan kaj brilan ambasadon de la bona volo el Usono! Ĝi konsistas el vere ĉarmaj homoj, profesoro George A. Connor kaj Fraŭlino Doris E. Tappan. Ili ambaŭ tre klare parolas kaj montras sian altan nivelon de kulturo kaj inteligenteco. Ili ne restas en oficialaj rondoj, tute kontraŭe, ili venas en niajn hejmojn kaj fratece vivas nian vivon, manĝas kun ni tute senceremonie, tute hejme, ĉar ili vere apartenas al nia granda rondo familia, ili estas veraj esperantistoj laŭ la lingvo, kiun ili brile posedas, kaj laŭ la ideo, kiun ili brave vivas.

La "Amerika Bulteno", semajna organo de la Kontoro de la Brazila Komercia Plivastiĝo de la Ministrejo por Laboro, Industrio kaj Komercio, kiu aperas en Nov-Jorko, en sia numero de la 12a de Majo lasta, publikigis, sub la titolo "Brazilo kaj la Esperantomovado" artikolon, kies esperantan tradukon ni tuj donas: "La Tutamerika Interlingva Asocio, organizaĵo, kies celo estas propagandi Esperanton, kiel rimedon pligrandigi la rilatojn inter la Amerikaj Landoj, okazigis la 9an de Majo kuranta, ĉe

la Hotelo New Yorker, kunsidon dediĉitan al Brazilo. S-ro José Garrido Torres, el la Brazila Informa Kontoro, ĝestis la kunvenon kaj faris paroladon. Dum la kunveno oni ludis filmon montrantan diversajn brazilajn aspektojn. La "Panel Room" de la Hotelo New Yorker, kie okazis la kunveno, estis ornamita per ĵurnaloj, revuoj kaj libroj en Esperanto eldonitaj en Brazilo. Brazilo, laŭ la opinio de la prezidanto de tiu Asocio, s-ro George A. Connor, estas la Okcidenta-duonsfera Lando, kie Esperanto pli progresis."

Kelkajn tagojn poste s-ro George A. Connor skribis leterojn al s-roj A. Couto Fernandes kaj Ismael Gomes Braga, per kiuj li sciigis ilin, ke li kune kun f-ino Doris Tappan, intencis viziti Brazilon, kie ili restos dum ĉirkaŭ ses semajnoj. F-ino Tappan, kiu estas instruistino, diplomita de la Kolumbia Universitato, kaj ricevis la Ĉe-metodan diplomon por la instruado de Esperanto, sin proponis fari en Rio-de-Janeiro praktikan kurson per tiu metodo. Ŝi reprezentis la Usonian Registaron ĉe la 34a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en 1939 en Berno, Svisujo. S-ro G. Connor estas la Delegito de IEL en Nov-Jorko kaj ĉeestis kelkajn universalajn kongresojn de Esperanto, kiel gvidanto de karavanoj de usonaj esperantistoj.

S-roj A. Couto Fernandes kaj Ismael Braga skribis al s-ro G. Connor klarigante lin pri kelkaj demandaj punktoj kaj elmontrante la ĝojon de la esperantistaro en Rio-de-Janeiro ilin akcepti.

Veturinte sur la ŝipo "Uruguai", kie s-ro George A. Connor faris por esperantan paroladon, niaj usonaj gesamideanoj alvenis al Rio-de-Janeiro la 14an de Julio. Ĉe la kajo ili estis akceptitaj de estraranoj de "Brazila Ligo Esperantista", de la ĉefdelegito de IEL kaj de aliaj gesperantistoj.

UNUAJ VIZITOJ

La 17an de Julio ili vizitis la "Brazilan Instituton de Geografio kaj Statistiko" dum la leciono de Esperanto tiam donata de ing. A. Couto Fernandes. Ilin akceptis tiu ĉi, la direktoro de la Ĝenerala Sekretariejo de l' Instituto, d-ro Alberto Martins, kelkaj sekciestroj kaj la asistanto de l' kurso, d-ro Mario Ritter Nunes. La usonaj gesamideanoj per ĝentilaj vortoj salutis la gelernantojn, kiuj estis antaŭe prezentitaj al ili de s-ro Couto Fernandes.

Vespere de la sama tago ili faris sian unuan viziton al la sidejo de Brazila Ligo Esperantista, kie ilin akceptis ĝia estraro kaj multaj el ĝiaj geanoj. Aliaj vizitoj al tiu sidejo en postaj tagoj sekvis la unuan.

ĈE-METODA KURSO

Je la 25a de Julio, ĉe la vasta salono de la "Teknika Instituto de Organizado kaj Kontrolo" (Servoj de Hollerith), kun sidejo sur la Avenuo Rio Branco, 26a, ĝentile cedita de ĝia prezidanto, s-ro Valentim Bouças, sub la aŭspicioj de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj de Brazila Ligo Esperantista, okazis bela Kunsido de Amerika Interamikeco.



Alveno al Rio-de-Janeiro de s-ro George A. Connor kaj f-ino Doris Tappan. De maldekstre dekstren: gesinjoroj Antonio Jose Vaz, s-ro A. Couto Fernandes, d-ro Carlos Domingues, f-ino Doris Tappan, s-ro George A. Connor, gesinjoroj d-ro Benjamin Camozato, s-ro Ismael Gomes Braga, s-ro Sílio Vaz kaj s-ro João Teles da Silva.

Konsistis la kunsido el parolado en portugala lingvo pri "La plej bona instrumento por la interkompreniĝo inter la amerikaj popoloj" farita de la universitata profesoro João B. de Melo e Souza, ĝenerala sekretario de B. L. E., kaj de praktika leciono de Esperanto per la Ĉe-metodo, farita de f-ino Doris Tappan, kun kelkaj antaŭaj vortoj de s-ro George A. Connor. Prezidis la kunsidon s-ro A. Couto Fernandes, prez. B. L. E., kiu prezentis al la ĉeestantaro la usonajn gesamideanojn. Sidis ĉe la prezida tablo ankaŭ s-ino Inês B. B. Correia de Araujo, reprezentantino de s-ro Valentim Bouças, d-ro Mario Ritter Nunes, reprezentanto de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, kaj s-ro Ismael Gomes Braga.

Prof Melo e Souza komencante sian paroladon rememoris sian vojaĝon al Usono, okaze de la Sesa Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉeestis kiel reprezentanto de la Brazila Registaro, kaj citis kelkajn frazojn de la saluto tiam farita de d-ro Zamenhof al Usono, kiu komencas per la jenaj vortoj: "Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas!" Lia parolado, kiu estas vera literatura verko, estis varme aplaŭditaj de la multenombra ĉeestantaro.

La praktika prov-leciono donita de f-ino Tappan, laŭ la metodo uzata en Nederlando kaj kreita de Pastro Ĉe, faris bonan impreson sur la ĉeestantaron.

taron, kiu per entuziasmaj aplaŭdoj elmontris sian ŝaton.

La prezidanto fermis la kunsidon dankante la paroladintojn, la institutojn, pro la morala kaj materia apogo donita al tiu bela festo de tutamerikanismo, kaj la ĉeestantaron.

Post la fermo de la kunsido multaj ĉeestantoj enskribiĝis en la kurson de f-ino Doris Tappan, kiu funkciis kun granda sukceso dufoje ĉiusemajne ĝis la 12a de Aŭgusto.

Vere alogaj estis tiuj lecionoj kaj ĉiuj gekursanoj tre bedaŭris, ke ili estis nur ses, pro tio ke f-ino Tappan devis forveturi al Usono pli frue ol ŝi deziris. Post kiam ŝi finis sian lastan lecionon dirinte kelkajn adiaŭajn vor-

tojn, f-ino Maria da Luz Costa, unu el ŝiaj gelnantoj, en ties nomo, per kortuŝaj vortoj en Esperanto, elmontris ilian kaj la sian dankojn pro ŝiaj belaj lecionoj, dezirante al ŝi feliĉan vojaĝon kaj donacante al ŝi modestan memorajon. F-ino Tappan tre emociita ilin dankis.

ŝa, Ministro por Eksterlandaj Aferoj, ankaŭ afable akceptis la klerajn usonajn geesperantistojn, kiuj estas al li prezentitaj de la prezidanto kaj vicprezidanto de "Brazila Ligo Esperantista", s-roj ing. A. Couto Fernandes kaj d-ro Carlos Domingues.

Dum ĝentila rendevuo, kiu daŭris

la vortojn en la helplingvo parolatajn de la vizitantoj. D-ro Julio Barata ĝentile permesis, ke f-ino Doris Tappan faru adiaŭan saluton en Esperanto al la brazila esperantistaro dum la "Horo de Brazilo".

Tiu ĉi saluto kaj ankaŭ ties traduko en portugala lingvo estis disradiita la 12an de Aŭgusto, ĝuste en la hieraŭa tago de la ekveturo al Usono de la nordamerikaj gesamideanoj. La prezidanto de B. L. E., jam ricevis telegramojn kaj leterojn el Fortaleza, Recife, Barreiros, Salvador kaj São Paulo, sciigantajn lin, ke oni bonege aŭdis la saluton.

ĈE LA "TOURING CLUBE"

Akompanataj de s-ro Couto Fernandes ili vizitis la belan sidejon de la grava "Touring Clube", kie ili estis afable akceptitaj de ĝia prezidanto, d-ro Juvenal Murinho Nobre. Ili dankis la ĝentilan leteron senditan de la estraro de l' Klubo al B. L. E. D-ro Nobre donacis al la vizitantoj belan ilustritan gvidlibron kaj mapon pri Rio-de-Janeiro kaj, laŭ peto de s-ro Couto Fernandes, promesis eldonigi, en Esperanto, ilustritan flugfolion de propagando de Brazilo.

ĈE RADISTACIOJ

Akompanataj de s-ro Ismael Gomes Braga kaj de aliaj geesperantistoj ili faris viziton al la "Nacia Radio", dum la *Gimnastika Horo*, kiun direktas s-ro Osvaldo Diniz Magalhães, kies simpatio al Esperanto jam estas tre konata de la brazila esperantistaro. S-ro O. Magalhães sciigis la gimnastikuloj pri tiu vizito kaj per ĝentilaj vortoj ilin dankis. La vizitantoj petis al s-ro Magalhães, ke li transdonu al d-ro Gilberto de Andrade, direktoro de la "Nacia Radio", ilian saluton.

Alian tagon ili vizitis la stacion de "Radio Transmissora" dum la kvinminuta leciono de Esperanto ĉiuvendrede donata de s-ro Ismael Braga.

ĈE INSTITUTO BRAZILU-USONO

La 11an de Aŭgusto, ĉe la salono de la "Instituto Brazilo-Usono", ĝentile cedita de ĝia estraro, okazis parolado farita en angla lingvo de s-ro George A. Connor kaj provleciono de Esperanto laŭ la Ĉe-metodo donita de f-ino Doris Tappan. Prezidis la kunvenon d-ro Gustavo Lessa, vicprezidanto de la Instituto. S-ro Couto Fernandes, prez. de B. L. E., prezentis la parolantojn al la ĉeestantaro kaj s-ro Ismael Braga, laŭ peto de s-ro G. Con-



INAŬGURADO DE KURSO DE ESPERANTO ĈE LA INSTITUTO DE ORGANIZADO KAJ KONTRURO (HOLLERITH). SUPRE: S-ro Prof. João B. de Melo e Souza, s-ro George A. Connor, S-ino Inês B. B. Correia de Araujo, reprezentantino de s-ro Valentim Bouças, prezidanto de la Instituto, s-ro A. Couto Fernandes, f-ino Doris Tappan, s-ro Ismael G. Braga kaj s-ro Mario Ritter Nunes, reprezentanto de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko". MALSUPRE: Parto de la ĉeestantaro.

ĈE LA USONA AMBASADOREJO

La Usona Ambasadoro, Lia Moŝto s-ro Jefferson Caffery, aŭdienco, akceptis la geesperantistojn f-inon Doris Tappan kaj s-ron George A. Connor, kiujn akompanis s-roj ing. A. Couto Fernandes kaj d-ro Carlos Domingues. S-ro Caffery afable interparoladis kun la vizitantoj, kiuj prezentis kaj donacis al li kelkajn brazilajn oficialajn publikigaĵojn en Esperanto, kiuj agrable impresis lin.

S-ro Ambasadoro diris, ke li plezure ĉeestos la kunsidon ĉe la Instituto Brazilo-Usono, kaj vidas kun intereso tiun movadon de amerika intermikaco pere de neŭtrala lingvo.

Post kelkaj tagoj s-ro Connor estis akceptita de la Ambasada Sekretario, kun kiu li denove parolis pri la celoj de sia vizito al Brazilo.

ĈE LA MINISTREJO POR EKSTERLANDAJ AFEROJ

Lia Moŝto s-ro d-ro Osvaldo Ara-

preskaŭ duonan horon, nia kanceliero faris kelkajn demandojn pri la Esperanto-movado en Usono kaj Brazilo. Lia Moŝto rememoris kelkajn epizodojn de sia restado en Usono kiel Brazila Ambasadoro.

Kaj ĉe la fino de la aŭdienco, li korece akompanante la vizitantojn ĝis la pordo de sia kabineto, ripetis, ke li havas plezuron fari ĉion eblan por la paco kaj amikeco inter la nacioj.

SALUTO EN ESPERANTO ĈE LA "HORO DE BRAZILO"

Kune kun s-ro ing. A. Couto Fernandes la usonaj geesperantistoj faris viziton al d-ro Lourival Fontes, ĝenerala direktoro de la Departamento de Gazetaro kaj Propagando, kiu pli ol unu fojon elmontris sian simpatian al Esperanto, kaj poste al d-ro Julio Barata, direktoro de la Divizio pri Radio. Tiu ĉi, kiu estas profesoro de latina lingvo, havis okazon konstati la facilecon de Esperanto, ĉar li ne bezonis interpretiston por kompreni

nor, en la esperanta kaj portugala lingvoj, rakontis pri la progresoj de Esperanto en Brazilo.

La ĉestantaro varme aplaudis la geparolintojn, kiujn dankis d-ro Lessa fermante la kunvenon.

EKSKURSOJ

Akompanataj de brazilaj geesperantistoj la usonaj gesamideanoj vizitis la plej konatajn vidindaĵojn en Rio-de-Janeiro, nome: la Botanikan Gardenon, la Muzeon de Belartoj, la Baumarbordojn, k. c.

Estis tre interesa por ili la vizito al la Librejo de la Federacio (Avenida Passos, 30), kie estas aĉeteblaj multaj libroj en kaj pri Esperanto.

Tre ĉarmaj estis la ekskursoj al la Monto Corcovado, sur kies pinto staras la monumenta Statuo de Kristo, al la supro de "Sukerkonuso", al la ĉarma bieno de geedzoj d-ro Antonio Malheiro, gepatroj de f-inoj Maria, Rosa kaj Debora Amaral Malheiro, kie ili pasigis dimanĉon, al la someraj urboj Petrópolis kaj Teresópolis, kie ilin regalis per tagmanĝo d-ro Agenor de Miranda kaj lia edzino.

EKVETURO

La 13an de Aŭgusto, je la 17a horo, dekajigiĝis la vaporŝipo "Argentino", sur kiu revenis al Usono niaj karaj gesamideanoj f-ino Doris Tappan kaj s-ro George A. Connor, post restado en Rio-de-Janeiro dum unu monato. Sur la kajo multaj brazilaj geesperantistoj ilin adiaŭis. Tiuj ĉi restis sur la kajo ĝis ili ne plu vidis la vaporŝipon. Al f-ino Tappan oni donacis multajn buketojn da belaj floroj.

Bonan vojaĝon kaj baldaŭnan revenon!

PAROLADO DE F-INO DORIS TAPPAN DUM LA "HORO DE BRAZILO"

Estas granda plezuro por mi kaj S-ro George A. Connor saluti la Esperantistaron kaj la popolon de Brazilo, pere de la "Horo de Brazilo", kaj pere de nia komuna interlingvo Esperanto. Ni portas ankaŭ al vi la salutojn de la Esperantistoj en Usono.

Antaŭ nur kvar semajnoj ni unue venis en vian belegan landon, sed mi opinias ke neniam ni povus denove ĝui tiel ĝojindan mallongan viziton. Ĉie ni trovas nur amikecon kaj helpemcon. Danke, ni estas certa, al la Esperantistoj kaj al la gastemeco de la popolo de Brazilo.

Pasintan vendredon, ni havis la honoron esti akceptitaj de la Brazila Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Lia

Moŝto D-ro Osvaldo Aranha. Li tre afable parolis kun ni pri Esperanto kaj pri la uzo de Esperanto kiel praktika, neŭtrala interlingvo inter la Amerikoj.

Esperanto vere povas funkcii kiel "La komuna interlingvo" de la du Amerikoj. Unue: Pro ĝia neŭtraleco kaj facileco — ĝi estas via dua lingvo kaj same la nia. Due: pro la fakto, ke jam ekzistas eminentaj kaj kapa-



Miss Doris Tappan

blaj Esperantistoj en la Amerikoj, kiuj povas reciproke interpreti la kulturon kaj vivon de la landoj. Jam ekzistas Esperantistoj — novaj kaj malnovaj — ekzemple en Usono, kiuj deziras korespondi kun la Esperantistoj de Brazilo kaj tiel lerni pri via lando, pri la historio kaj progreso de via lando kaj pri vi mem, kiel amikoj!

E estas la deziro de S-ro Connor kaj mi — kaj de niaj kluboj — ke ni helpu reciproke en la efektiviĝo de la deziro por profunda kono kaj kompreno inter la landoj kaj popoloj de la Amerikoj — kaj precipe inter Brazilo kaj Usono, la du plej grandaj landoj de la Okcidenta Duonsfero.

Kaj nun, karaj amikoj, mi invitas vin por veni al Usono kaj viziti nin: mi promesas, ke vi estos tiel bone gastigitaj en nia lando kiel ni estis en la via — La Esperantistoj atendas vin!

PALAVRAS DE MISS DORA TAPPAN

E' um grande prazer para mim e para o Sr. George A. Connor saudar os Esperantistas e o povo do Brasil, por meio da "Hora do Brasil" e por meio da nossa comum interlingua Esperanto. Trazemo-vos tambem as saudações dos Esperantistas dos Estados Unidos.

Faz apenas quatro semanas que pela primeira vez chegamos ao vosso belís-

simo país, mas pensamos que nunca poderíamos gozar novamente uma breve visita de tal forma agradável. Por toda parte encontramos somente amizade e cooperação. Graças, eu estou certa, aos Esperantistas e à hospitalidade do povo brasileiro.

Na sexta-feira passada, tivemos a honra de ser recebidos pelo Ministro das Relações Exteriores, S. Excia. o Sr. Dr. Osvaldo Aranha. Ele falou-nos com muita amabilidade do Esperanto e do emprego do Esperanto como instrumento de comunicação prático e neutro entre as Américas.

O Esperanto pode efetivamente funcionar como "A interlingua comum" das Américas. Primeiro: por sua neutralidade e facilidade — ele é a vossa segunda língua e igualmente a nossa. Segundo: pelo fato de que já existem Esperantistas ilustres e competentes nas Américas, os quais podem interpretar mutuamente a cultura e a vida de seus países. Já existem Esperantistas — novos e antigos — por exemplo nos Estados Unidos, que desejam corresponder com os Esperantistas do Brasil e dessa forma adquirir conhecimentos a respeito do vosso país, da história e do progresso do vosso país, e de vós mesmos, como amigos!

E' desejo do Sr. Connor e meu — e de nossos clubes — que nos auxiliemos mutuamente na efetivação do desejo de profundo conhecimento e compreensão entre os países e os povos das Américas — e principalmente entre o Brasil e os Estados Unidos, os dois maiores países do hemisfério ocidental.

E agora, caros amigos, eu vos convido a vir aos Estados Unidos e visitar-nos: prometo-vos que tereis em nossa terra hospitalidade igual à que tivemos na vossa — Os Esperantistas vos esperam!

HEJM' SUR LA STEP'

(1) Ho, hejm' sub la bel' de sennuba ĉiel'.
Kun la cerv', antilop' kaj bizon';
Malofte la vort' malkuraĝa pri sort'.
En la vasta paŝtej-region'.

(2) Kiel ofte al stel' en la nokta ĉiel'.
Sub la bril' de la astra trezor'.
Dum longa rigard' mi seĉvolis pro ard'.
Ĉu sur ili superas la glor'.

Rekantajo:

Hejm', hejm' sur la step',
Kun la cerv', antilop' kaj bizon'.
Malofte la vort' malkuraĝa pri sort'.
En la vasta paŝtej-region'.

Tradukis — George A. Connor.

LA ANIMO DE L'ARBOJ

Carlos Manhães

Estis frue matene, la suno ekleviĝis, banante per orlumo la montegojn. En la densa palmaro, staranta meze de la kampo, ĉirpadis la cikadoj, kaŝigintaj ĉe la flirtantaj branĉoj, kiujn la vento kisadas senĉese. Kaj aŭdante la amatajn cikadojn, oni tuj kredas, ke la tiel verda palmaro alparolas la blujn montegojn varmigatajn de la suno.

Ĉiu arbo, gardanta en siaj branĉoj la mielkoloran korpon de cikado — kantanta animo de gaja somero —, estas arbo feliĉa! Ĉar la feliĉo, laŭ la kompreno de l' mondo, estas esprimscii, per rideto aŭ per kanto, grandan ĝojon, kiu, kelkfoje, eĉ ne loĝas en la koro.

La rideto de l' arboj estas la floroj. Sed ilia animo, se la arbo posedas animon, povas esti nur la cikadkanto.

Tradukis

A. Dieff.

NOTO DE LA REDAKCIO. Carlos Manhães, jam mortinta, kiu estis la "aveto" de la infanoj, kiuj tiam legis la revuon "O Tico-tico", tre simpatiis Esperanton.

* * *

GENEZO...

— Mi estas la *Vero*.— Mi estas la *Mensogo*.

— El ni konsistos la ĉiama triangulo de l' ĉiuhoma stertorado: mi, mi estas la *Sango!*

Kaj iam praege antaŭe ampleksa globo ekturniĝis en la etero...

Aldino de Freitas.

D-RO L. DA CAMARA CASCUO

D-ro Luiz da Câmara Cascudo, distingita advokato, ĵurnalista kaj verkisto en ŝtato Rio-Grande-do-Norte, venis al Rio-de-Janeiro por partopreni la Kunvenon de la Kunsilantaroj de Geografio kaj Statistiko. Ĉar d-ro Câmara Cascudo estas honora ano de la "Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte" kaj membro de "Brazilia Ligo Esperantista", lin vizitis la ties prezidanto, s-ro A. Couto Fernandes, kaj havis kun li ĉerman interparoladon pri la Esperantomovado en Brazilo kaj speciale en lia ŝtato.

D-ro Câmara Cascudo, kiu estas ankaŭ Kultura Direktoro de la loka Radisocieto, donis al li la agrablan sciigon pri la baldaŭa starigo en ĝia programo de esperantista horero. Niajn gratulojn al la brazilia esperantistaro!

RIVERO KAJ RIVERETO

Francisco Vilela Barbosa

(markizo de Paranaguá, verkisto brazila, 1769-1846)

Al rivereto trankvila diris river' malhumila:
"Mi bedaŭras vin, malriĉa, malrapida, malfeliĉa!
Vi, kun tiom da kurbaĵoj inter rampantaj kreskaĵoj, fluas sen nomo, kaŝata, dume mi, bone konata, en la urbojn plej belegajn metas la ondojn nombregajn, portante riĉan donacon en plej malproksiman spacon.
Cent riveretoj min petas je aliĝo kaj sin jetas en mian fluan kontente, sen deflankiĝi momente.
Kuraĝon mi havas tian, ke ĉion kio en mian vojon venis, mi formetas."

Tiel la river' parolis kaj pli multe diri volis pri l' nobla deveno sia, pri sia eĉ' energia; sed diras al la kuraĝa la rivereto pli saĝa:

"Amiko, ĉu ankaŭ mi ne eliris, kiel vi, el sama loko de l' monto? kaj, naskite de la fonto, ĉu de ambaŭ ni l' akvaro ne fluis tra la arbaro: ama kaj sub sama herbo? Kial do nun via cerbo tiel fierigas sin? Nur okazo igis vin forlasi lulilon vian, preni direkton alian.
Kie la teren' kliniĝas, vi en kur' pli rapidiĝas, sorbante la riveretojn, kiu donas l' akvaretojn al vi, vin pligrandigante.
Je la long' akompanante tiujn ĉi montetojn belajn miajn akvojn kristalhelajn mi kondukas senfiere.
Ĉu tial, diru sincere, vi pli nobla esti kredas? Pli da akvo vi posedas, sed ĉu ne estas egala la mia, pura, kristala?
Kie kuras via fluo, timon kaŭzas via bruo; mi, kun klara susurado, aperas en bonfarado: mi la teren' malsekiĝas, la kamparon fruktozigas.
Dum ruinojn vi preparas, mi bonaĵojn multajn faras,

BRAZILA REVUO DE GEOGRAFIO

"Revista Brasileira de Geografia" (Brazilia Revuo de Geografio), oficiala organo de la Nacia Konsilantaro de Geografio, fako de la Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko, registara departemento. N.º 1 de la Tria Jaro — Januaro ĝis Marto 1941, kun 224 paĝoj. Ĝi enhavas kvar ĉefartikolojn kun resumo en 5 naciaj lingvoj kaj en Esperanto. Jen la titoloj de tiuj artikoloj: Urbo "kreita" — Urba Geografio kaj ĝia influo sur la saneco de la urboj — Geografio de la transportoj en Brazilo — kaj — Agro-geologia planfarado de ŝtato São Paulo.

N.º 2 de la Tria Jaro — Aprilo ĝis Junio 1941, 492 paĝoj. Ĝi enhavas kvar ĉefartikolojn kun resumo en 5 naciaj lingvoj kaj en Esperanto. Jen la titoloj de tiuj artikoloj: La Geografio en la duagrada kurso — La Groto de Maquiné kaj ties ĉirkaŭaĵoj — Regiona divido de Brazilo — kaj Geografio de la transportoj en Brazilo.

Bonvolu legi la anoncon pri tiu Revuo sur alia paĝo de nia bulteno.

REVUO DE LA SOCIETO DE GEOGRAFIO DE RIO-DE-JANEIRO

Jam aperis la 47a numero (1940) de tiu grava revuo, kiu publikigas nur en Esperanto, resumon de ĉiuj artikoloj. Ĝi enhavas 210 paĝojn, dek artikolojn pri la antaŭ nelonge mortinta Generalo Moreira Guimarães, kiu dum multaj jaroj prezidis la Societon de Geografio kaj estis ankaŭ prezidanto de Brazilia Klubo "Esperanto", kaj 15 artikolojn pri Geografio. Unu el tiuj artikoloj estas transskribo de artikolo aperinta en "O Brasil Esperantista". Finas la volumon raporto pri la aktivecoj de la Societo dum la jaro 1940a.

Ĝis je l' fino de la vojo intermiksos min, kun ĝojo, al la mar' profunda, vasta, nia cel' komuna, lasta: tie ni alproksimiĝos iam ambaŭ kaj kuniĝos."

El "Diverskolora Bukedeto", de Francisco Valdomiro Lorenz.

NOVAJ

En *Belgujo* la Esperantista grupo "Paco kaj justeco" en Brugge organizis publikan Esperanto-kurson; kontentiga partoprenado. Pri aliaj novaĵoj ni ne havas sciigon el tiu de la sorto terure frapita lando.

Des pli detalaj kaj ĝojigaj estas la novaĵoj el *Brazilo*. En la decembra numero 1940 de la oficiala organo de Brazilia Ligo oni raportas, ke la Brazilia instituto de geografio kaj statistiko eldonis sian oficialan bulleton kun resumo en Esperanto. La katolikaj ĵurnalistoj dum kongreso faris favoran decidon por Esperanto. La radiosocieto en São Paulo ĉiutage okazigas Esperanto-dissendadon. Sub la rubriko "Brazilia kroniko" oni legas kun miro kaj admiro pri la neordinare vigla kaj sukcesa laboro de la brazilaj esperantistoj kaj pri iliaj kluboj. La sudamerikaj samideanoj vere montras sian volon kaj kapablon dum la milita tempo de Eŭropo transpreni la taskon fariĝi gvida Esperanto-lando!

Niaj britaj samideanoj kun imitinda persisto daŭrigas sian laboron. Jen citaĵo el la jan.-febr. numero 1941 de la gazeto "La Brita Esperantisto": En Britujo la situacio ne estas tiel malbona, kiel oni povus atendi. En multaj urboj, precipe tiuj, kiuj suferis de aeratakoj, kursoj kaj grupoj preskaŭ ĉesis kunveni. Sed ne ĉie. En Bristol ekz., spite ĉion estas vigla agado kaj multaj kursoj. En kelkaj urboj, al kiuj iris multaj evakuitoj, starigis grandaj kursoj, kaj en multaj urboj pli malgrandaj vekigis intereso pri Esperanto. Krome, estas kursoj kaj izolaj lernantoj en kelkaj soldatejoj kaj aviadejoj."

Post preskaŭ tutjara atendado ni ricevis aktualan numeron (febr. 1941) de la Dana Esperanto-gazeto. Estas vere ĝojige, ke la Esperantistoj en Danujo energie daŭrigas sian laboron. La nomita gazeto nome raportas pri jarkunvenoj de pluraj lokaj grupoj, pri kursoj eĉ porinfanaj en vesperaj lernejoj, pri reciproka vizitado de grupoj kaj pri ekonomie sukcesa jaro de la dana ligo. La danoj nun planas rondvojaĝon de sveda prelegisto kaj planas ankaŭ somerajn studkursojn, simile al multaj antaŭaj jaroj.

Kvankam la cirkonstancoj nuntempe estas sufiĉe premaj en *Finnlando*, oni tie komencis denove aktive labori por nia afero. En januaro 1941 la staciestro H. Salokannel kaj la instruisto Tyyne Salokannel faris prelegvojaĝon en la mezlanda provinco Savo. La tuja rezulto estis 5 novaj kursoj.

NEKROLOGO

Dum la monato Julio mortis du anoj de niaj Ligoj. La unua s-ro Kolonelo *Lauriano das Trinas*, milita pensiulo, unu el la pioniroj de nia movado en Brazilo. Li esperantigis en la jaro 1906a kaj estis kunfondinto de "Brazilia Klubo Esperanto" kaj de "Brazilia Ligo Esperantista". En tiu sama jaro li direktis kurson de Esperanto en kolegio Vicgrafo Cairú. Li apartenis al la estraro de Brazilia Klubo Esperanto kaj partoprenis preskaŭ ĉiujn brazilajn kongresojn de Esperanto kaj esperantistajn vespermanĝojn. Pro sia bona karaktero li estis tre estimata de siaj samideanoj. Al lia familio niajn sincerajn kondolencojn!

La dua estas s-ro *Hieronides Taciano Bellez*, kiu okupis la oficon de telegrafisto ĉe la Nacia Telegrafo, ĝis la jaro 1940a, kiam li emeritigis. De multaj jaroj li estis ano de Brazilia Klubo Esperanto kaj de la nacia kaj internacia Ligoj. Li estis modesta, sed tre sincera amiko de Esperanto. Paco al liaj cindroj!

El la diversaj eksterlandaj esperantistoj mortintaj lasttempe ni devas citi s-ron *Edward A. Milidge*, la tre konatan Akademianon, kiu mortis kun la aĝo de 75 jaroj. Li naskiĝis la 12 an de Julio 1965a en Vingeton-on-Thames kaj edukigis en Portsmouth School. Li estis membro de B. E. A. Lia ĉefa verko estas Esperanto-English Dictionary, jam en ĝia sesa eldono. Ni sendas kondolencojn al lia familio.

Kelkaj tagaj gazetoj ankaŭ afable citis la vojaĝon. Dank' al kompleza propono de Sveda Eldona Societo Esperanto, la finnaj samideanoj rajtas aboni la svedan Esperanto-gazeton je reduktita prezo. Tiel ebligis al 100 finnoj havigi tiun gazeton, kiu do fariĝis provizora organo de la finnoj.

Ni estas feliĉaj havi eblecon publikigi kelkajn aktualajn informojn el *Francujo*. Montrigas, ke niaj samideanoj tie daŭrigas la laboron kaj eĉ starigis novajn kursojn. Kortuŝitaj ni eksciis, ke nia kara prezidanto Bastien fartas bone kaj ankaŭ amiko Petit. Bone sanas ankaŭ niaj karaj samideanoj Archdeacon, Couteaux kaj Guillaume. Sed s-roj Waringhien kaj Jossinet estas en milita malliberejo. Niaj francaj kolegoj asertas, ke iliaj

ESPERANTO EN ITALUJO

Ni ricevis samtempe tri leterojn senditajn de la "Ente Italiano per la Audizioni Radiofoniche", kies sidejo estas en Romo (Via Montello, 5) kaj programon de la disradiadoj faritaj de ĝiaj stacioj dum la nunjara Majo, per kiu ne eksciis ke tiam ankoraŭ okazis disradiado en Esperanto pere de tri stacioj (lunde: Brazilia horo — 21.20).

El unu el tiuj leteroj ni elĉerpis la jenon: "Kun granda ĝojo ni akceptis la numeron 34-35 de "O Brasil Esperantista", kaj avide legis ties enhavon. Ni laŭdas vian laboron por la lingvo en la teritorio de la Brazilia Respubliko, subtenata de la respektinda Prezidanto Getulio Vargas. Traleginte la diversajn artikolojn, ni povis recevi ideon pri la taskoj plenumitaj, pri la vigleco de la tieaj samideanoj, pri la entuziasmo kiu suverene regas ĉe nia sud-amerika kolegaro. Daŭrigu, kaj ne malkuraĝigu: kontraŭe revu pri la pli grandaj sukcesoj de la estonteco. Tiam, kiam la mondo vivos trankvilajn tempojn, la esperantistoj estos fieraj kaj pretaj rekomenci la porpacan laboron por la homaro. Ankaŭ ni daŭrigas niajn dissendojn en Esperanto."

MONUMENTO DE CARLO BOURLET

(ESPERANTO-MODELO)

Carlo Bourlet foi grande e dedicado amigo do Brasil. Seu nome não deve desaparecer com o tempo, mas, ao contrário, tornar-se melhor conhecido e mais amado no futuro.

Em pequeno livro de leitura, destinado aos cursos superiores de Esperanto, aparecem 112 páginas que farão conhecido e estimado pela juventude esperantista brasileira esse genial pensador desaparecido em 12 de Agosto de 1913.

1 vol. de 112 páginas, com o retrato de Carlo Bourlet, e encerrado com a palavra do Dr. Zamenhof, brochado 4\$000

Encomendas à Liga Esperantista Brasileira, Praça da República, 54, sob., Rio-de-Janeiro.

pensoj iras al la esperantista samideanaro en la tuta mondo!

.....
.....
(El "Esperanto Internacia").

BRAZILA KRONIKO

CEARÁ. Fortaleza. — La gazeto "O Povo" sciigis sian legantaron pri la saluto farota en Esperanto de f-ino Doris Tappan, dum la "Horo de Brazilo", al la brazila esperantistaro.

RIO-GRANDE-DO-NORTE. Natal. — La dudek-unuan de Majo okazis, ĉe s-ro Jerônimo dos Santos, nuna prezidanto de la loka asocio, la ekposedo de la unua estraro de la ĵus fondita Esperantistina Grupo "Lidja Zamenhof", kies sidejo estas: Rua Borborema, 1032, en la kvartalo Alecrim. Prezidis la kunsidon s-ro Luiz Maranhão Filho, reprezentanto de la gazeto "República". La estraro konsistas el la jenaj esperantistinoj: Crimelhilda dos Santos — prez., Alba Medeiros kaj Maria Aparecida Bezerra — sek-inoj, Aliete Silva — kas., Valdemira Lopes — oratorino — kaj Marieta Leite — bibliotekistino.

Paroladis f-inoj Crimelhilda dos Santos kaj Valdemira Lopes kaj s-ro José Alcantara Barbosa, reprezentanto de Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte. Fermis la kunsidon ties prezidanto, kiu reliefigis la personecon de la filino de Zamenhof kaj la neceson disvastigi Esperanton, kiel kunfratigilon de la popoloj. Sub direkto de leŭtenanto José Porfirio oni kantis la esperantistan himnon de la grupaninoj. Donacitajn de s-ro Moacir Cunha, tiam en Recife, ricevis librojn kaj insignojn ĉiuj estraraninoj.

Daŭras la kurso direktata de s-ro Arlindo Castor Lima, kiu aperigas sur la kolonoj de "O Diário" artikolojn pri Esperanto. "A Voz da Caserna" publikigis notojn pri tiu festo kaj artikolojn de s-roj Arlindo de Lima kaj Moacir Cunha.

Tiu ĉi sciigis nin, ke oni klopodas, por ke la baldaŭ inaŭgurota "Radio Educadora de Natal" disradiu ĉiusemajne esperantan horkvaronon. Ke tio efektiviĝu, estas nia forta deziro!

PERNAMBUCO. Recife. — Aperis la Aprila kaj Maja numeroj de "Pernambuco Esperantista", kiu enhavas, precipe, literaturaĵojn. Estas ankaŭ tre interesaj la lecionoj de Esperanto kaj la portugala fako pri la Esperanto-movado.

De f-ino Artemisa Vidal de Araujo, prez. de la loka asocio, nia Ligo ricevis telegramon, sciigantan al ĝi, ke oni aŭdis bonege la saluton disradiitan de f-ino Doris Tappan dum la "Horo de Brazilo". D-ro Benjamin Camozato kaj lia edzino, fervoraj geesperantistoj el Porto-Alegre, nun en vizito al la Brazila Venecio alportis

al la tiej gesamideanoj korajn salutojn de la estraro de B. L. E.

BAÍA. Salvador. — Ĉar ne estis eble pro manko de specialaj preslitoj la eldono de la ilustrita broŝuro pri ĉefurbo Salvador kun la tekstoj ankaŭ en Esperanto, s-ro Jaddo Couto Maciel telegrafis al ing. A. Couto Fernandes, kiu interparolis pri tio kun d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝen. sek. de "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", kaj d-ro Neves da Rocha, ĉefurbestro de Salvador, tiam en Rio-de-Janeiro. Laŭ ĝentila propono de d-ro Teixeira de Freitas, akceptita de d-ro Neves da Rocha, la Instituto prenis sur sin la taskon fari la esperantan eldonon de tiu broŝuro kaj ĝin dissendi eksterlanden. Pere de s-ro Antonio Loureiro de Souza, oficiro ĉe la statistik-servo en ŝtato Baía, kiu nun ĉeestas en Rio-de-Janeiro la perfektigan kurson de la Instituto, tiu ĉi jam ricevis la kilsĵojn de la portugala broŝuro kaj pri la traduko esperanten de la tekstoj zorgis la prez. de nia Ligo.

Baldaŭ aperos la esperanta eldono de la bela broŝuro de la ĉefurbo de ŝtato Baía, pri kiu delonge revadis la sindona samideano Jaddo Couto Maciel.

ESPÍRITO SANTO. Castelo. — Fondiĝis esperanta grupo, kies estraro estas la jena: Prez. — d-ro Antonio José Rua, viceprez. — d-ro Carlos T. de Campos, la sek. — d-ro Otto Vieira Machado, 2a sek. — s-ino Hersila Valverde, orat. — d-ro Wolghano Barbosa, kas. — d-ro Carlos Lomba kaj biblio. — s-ino Carly Lomba. Prezidis la inaŭguran kunsidon d-ro Menezes Pimentel, juĝisto.

SÃO PAULO. São Paulo. — La Esperanto-movado en tiu tre progresema ĉefurbo iras kontentige, per kurso, notoj en ĵurnaloj kaj per radio. Nun la ĉiutaga dsradiado farata de la stacio de "Radio Piratininga" okazas dum la unua kvarono post la 17a horo. De la 25a de Marto 1940a ĝis la 3a de Julio lasta ĝi disradiis 376 programojn, kiuj daŭris 94 horojn aŭ 5.640 minutojn.

Ĉar la usonaj gesamideanoj ne povis veni al São Paulo, s-ro Osvaldo Leite de Moraes kaj lia frato Fernando intencis ilin viziti en Rio-de-Janeiro. Bedaŭrinde pro neatenditaĵo ili ne povis plenumi sian fortan deziro.

S-ro Osvaldo Moraes sciigis nin, ke en São Paulo oni tre bone aŭdis la

adiaŭan saluton faritan de f-ino Tappan dum la "Horo de Brazilo".

Cunha. — Sroj Eduardo Querido kaj Benedito Felipe interesigis pri Esperanto kaj helpas ĝian propagadon.

Assis. — D-ro Paulo Botelho de Carmargo interakordigas kun la estraro de la loka radistacio pri disradiota kurso de Esperanto.

SANTA CATARINA. Joinville. — Ni ricevis leteron de s-ro Delio Pereira de Souza, per kiu li informas nin, ke li organizis grupeton por propagandi Esperanto, kiu konsistas el ses membroj kunvenantaj ĉiumerkrede. En la loka ĵurnalo "A Notícia" aperas artikoloj pri Esperanto. La grupeto deziras aliĝi al niaj Ligoj. Pri la efektiviĝo de tiu deziro ni detale skribis al li.

MINAS GERAIS. Belo Horizonte. — Akceptite kiel ano de la loka literatura asocio de studentoj, nomata "Centro de Estudos Justino Mendes", s-ro Luis Anacleto Silos prezentis okaze de sia ekposedo tezon pri "Esperanto estas nediskutebla konkero". Ĉar ĝiaj anoj estas kleraj idealistoj, li esperas, ke Esperanto estos de ili bone akceptata. Ĝia sidejo estas en la Rektorejo de la Universitato, sur strato Guajajaras, 176.

Suiz de Fora. — La sekretario de Grupo Esperantista "Abel Gomes" sciigis al s-ro Ismael Braga, ke baldaŭ estos inaŭgurata kurso de Esperanto pere de loka radistacio, kiun direktas kapitano Jorge Firmino Santana, el la Ŝtata Polico.

BONVOLU ELEKTI REPREZENTANTON ĈE LA KUNSIDOJ DE "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA".

BIBLIOGRAFIO

LA VIVO DE LA ESKIMOJ. (Teksto verkita de Prof. Agostinho Silva). El portugala lingvo tradukis M. F. Eldonis "Rondeto Zamenhof". — Porto — 1941. Ĝi apartenas al la kolekto da tekstoj por la junularo nomita "Ĉirkaŭ la Mondo". Tre interesa legaĵo, kiun ni rekomendas al niaj legantoj. Prezo: Unu respondkupono aŭ 2\$000. Mendu ĝin al Brazila Ligo Esperantista.

PORQUE SÓ O ESPERANTO ?

Por iniciativa da Associação Esperantista da América do Norte, aceita pelas associações de esperantistas de todas as Américas, a semana de 20 a 26 de abril de 1941 foi consagrada ao serviço de divulgação do Esperanto.

As vantagens da existência de uma língua neutra para a ciência, o comércio, o turismo, a arte, mas acima de tudo para a pacificação dos espíritos, não é mais contestada em nossos dias por pessoa alguma inteligente e refletida. Tais vantagens estão ao alcance de todos os estudiosos. Certa confusão sobrevive ainda a respeito da universalidade de algumas línguas naturais. O inglês, o francês, o alemão, o espanhol teem muita significação cultural, prestam serviços grandes ao comércio, e pessoas menos avisadas supõem que uma dessas línguas poderia ser escolhida por um acôrdo internacional e posta a serviço de todas as nações. Presume quem assim pensa que seria mais fácil e mais seguro adotar uma dessas línguas, do que começar de novo a obra toda pela divulgação de um idioma neutro artificial, como é o Esperanto. É essa a questão que deve ser suficientemente esclarecida.

A primeira dificuldade seria o zelo muito natural das outras nações. Transformar uma língua estrangeira em língua de cultura internacional seria sacrificar todos os povos a um único, porque o povo cujo idioma fosse o adotado fatalmente dominaria todos os outros. Seus filhos o possuiriam melhor, seriam os únicos perfeitos no manejo do idioma, e todos os outros seriam ridículos "estrangeiros". Sua literatura dominaria no mundo e com ela todas as vantagens culturais, políticas, econômicas, inerentes à difusão da língua. Todas as nações, portanto, só podem aceitar seu próprio idioma para o uso universal, como já tentam fazer hoje. Qualquer acôrdo pacífico é impossível e a imposição pela força, como procederam os imperialismos no passado estabelece verdadeiros abismos de ódio e de reações contra os vencedores, anulando a produtividade intelectual dos vencidos na língua que humilhantemente lhes é imposta por um imperialismo estrangeiro. Toda a discussão teórica nesse sentido, porém já é inútil e ociosa, porque há centenas de anos tais línguas são obrigatoriamente ensinadas nos ginásios, sem os resultados práticos desejados. Ninguém as aprende suficientemente para nelas escrever livros, publicar revistas científicas, etc. Logo a vida mesma já condenou irremediavelmente a tentativa de adotar uma ou algumas línguas estrangeiras para uso internacional. Não é preciso por abaixo uma coisa que já caiu naturalmente por impossível de vingar.

Todas as línguas naturais — português, francês, inglês, alemão, espanhol, latim — são repletas de dificuldades invencíveis para os estrangeiros. Foram formadas pelo uso cego, sem plano algum preestabelecido, antes de serem escritas. Encheram-se de erros de toda sorte que se não podem mais corrigir. Tais erros a que chamamos "irregularidades", "idiotismos", formam uma carga imensa mesmo para os nativos que praticam a

vida toda no uso do idioma. Os filhos de outras pátrias, mesmo depois de longos e penosos esforços, pronunciam **barbaramente**, enganam-se na conjugação dos verbos irregulares, no emprego dos modos e tempos, no genero gramatical, e jamais aprendem um infinito de idiotismos criados durante séculos ou milênios. Há idiotismos em nossas línguas modernas que foram cunhados pelos hebreus há tres mil anos e nos chegaram através da Bíblia outros nos foram trazidos pelos clássicos gregos e romanos; outros do período pre-literário de nossos belos idiomas. Há um infinito de dificuldades a vencer para possuir passavelmente uma língua estrangeira. Só as pessoas talentosas e desocupadas, ricas e estudiosas, mui excepcionalmente chegam a aprender uma língua estrangeira até poderem nela escrever livros. Tais pessoas são raríssimas, uma em muitos milhões, mas quasi nunca publicam livros em outra língua senão em sua própria nacional, por sentimento patriótico. Assim o problema por si mesmo se resolveu contra as línguas estrangeiras.

O Esperanto foi cientificamente elaborado em um gabinete com o plano preestabelecido de ser claro e fácil para todos. Nenhuma subtilidade de pronúncia, nenhuma irregularidade gramatical, nenhum idiotismo escuro, nenhuma extravagância, como género gramatical e verbos defectivos, existe na língua neutra artificial Esperanto. Absolutamente neutra, não pertencendo a povo algum em particular, mas a todos igualmente, não fere os sentimentos nacionalistas de ninguém desde que esses sentimentos sejam honestos e justos.

Todos os países que fazem campanha para nos impor seus idiomas nacionais, já foram compelidos a ter programas de rádio em português e muitas outras línguas. Foram a isso forçados depois de séculos de esforços para impor seus idiomas ao mundo, porque verificaram que ficavam inteiramente isolados do pensamento universal por irradiarem somente em língua nacional. A grande estação da B. B. C., durante anos só irradiava em inglês, mas hoje transmite seus programas em trinta e duas línguas diferentes. Assim sucedeu igualmente às estações da Alemanha, da França, do Japão, dos Estados Unidos. Em outras palavras: está proclamado pelo rádio que falharam as tentativas de universalização das línguas de imperialismos. O rádio nos apresenta rapidamente um inglês muito diferente daquele com que estamos familiarizados nos livros, isto é, uma língua falada que pouco se parece com aquela que aprendemos a ler, e não nos espera tirar palavras no dicionário!

São tão grandes as diferenças entre a pronúncia e a escrita das línguas naturais que pessoas muito versadas na leitura dos clássicos ingleses ou alemães, sentem-se incapazes de entender um discurso pelo rádio numa dessas línguas.

Precisamente o contrário dá-se com o Esperanto. Estritamente fonética a escrita, precipuamente literário o idioma, quem o sabe ler, compreende perfeitamente um discurso pelo rádio ou mantém uma palestra sem hesitação alguma.

BRAZILA GAZETARO KAJ ESPERANTO

Jen estas la brazilaj gazetoj, kiuj ni legis, aperintaj notojn pri la vizito de la usonaj geesperantistoj: "Jornal do Comércio, Correio da Manhã (kun fotografaço), Jornal do Brasil, O Globo, A Noite, O Jornal, A União, O Reformador, The News (kun fotografaço kaj longa artikolo), Brazilian American (kun longa artikolo), Vamos ler! (fotografaço), ĉiuj en Rio-de-Janeiro; O Estado de S. Paulo, O Diário, el Santos (Ŝtato São Paulo); O Povo, el Fortaleza (Ŝtato Ceará).

La "Virina Suplemento", multkolore presita, kiu aperas samtempe ĉiudimanche em 9 malsamaj ĵurnaloj el Rio-de-Janeiro kaj el Ŝtatoj São Paulo, Minas Gerais, Pernambuco, Ceará kaj Rio-Grande-do-Sul, publikigis sur la unua paĝo grandan figuron de amerikanino rajdanta sur azeno kaj longan artikolon por Esperanto titolitan "La malbeno de Babelo".

Tiuj ĵurnaloj apartenas al societo nomata "Asociitaj Ĵurnaloj", el kiuj tiu aperanta en Rio-de-Janeiro estas "O Jornal".

La gazeto "Juventude Unida" (Unuigita Junularo), organo de la brazila filio de "Studenta Internacia Societo", kun sidejo en Nov-Jorko, publikigis artikolon titolitan "Esperanto kiel faktoro de Internacia Alproksimiĝo". Ĝia direktoro en Brazilo estas s-ro Neyzir A. Couto — Cairá postal 2804. Rio-de-Janeiro.

KORESPONDADO

Deziras korespondi kun geanoj el la tuta mondo pri diversaj temoj kaj ŝanĝas p. i. kaj pm. kontraŭ sendo de libroj, revuoj kaj esperantaĵoj — D-ro J. Miguel Reges, Delegito de I. E. L. TARTAGAL. Manuela Pedraza F. C. C. N. Salta, Argentino.

Só o Esperanto, portanto, resolveu justa, clara e cabalmente o problema da compreensão internacional para todas as pessoas que o tenham aprendido e que o empreguem na prática. Contra os sofismas vãos existe a experiência prática. Há congressos universais de esperantistas todos os anos, desde 1905, há visitas, há filmes cinematográficos, há discos fonográficos, há programas de rádio. A língua falada é precisamente a mesma dos livros, das revistas, dos jornais e das cartas. Disto podem dar testemunho todos os esperantistas em qualquer país.

Diante dos fatos vivos, todas as teorias são "conversas moles"!

Grupoj Aligintaj al B. L. E.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO". (1906). Sidejo: *Praça da República, 54, Rio-de-Janeiro.*

SUDBRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: *Rua dos Andradas, 1431, Porto Alegre, Rio Grande do Sul.*

CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS. (1932). Sidejo: *Rua Baía, 57, Santos, Est. São Paulo.*

ESPERANTA GRUPO DE BAÍA. (1936). Sidejo: *Rua Bangala, 18, Salvador, Baía.*

S. PAULO ESPERANTA KLUBO. (1937). Sidejo: *Rua Alabastro, 447, São Paulo.*

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIO. (1937). Sidejo: *Rua do Príncipe, 398, Recife, Pernambuco.*

ESPERANTO KLUBO DE SANTO AMARO. (1937). Sidejo: *Av. Viana Bandeira, 14, Santo Amaro, Baía.*

GRUPO ESPERANTISTA "ISMAEL GOMES BRAGA". (1938). Sidejo: *Praça D. Moura, 334, Garanhuns, Pernambuco.*

GRUPO ESPERANTISTA DE ARAQUARI. (1939). Adreso: *Caixa postal 73, Araguari, Minas Gerais.*

KATOLIKA ESPERANTISTINA KLUBO. (1939). Sidejo: *Rua Benficia, 2457, Fortaleza, Ceará.*

ESPERANTO-KLUBO DE ALAGOINHAS. (1940). Sidejo: *Rua 24 de Outubro, 12, Alagoinhas, Baía.*

"CARLO BOURLET" ESPERANTO-GRUPO. (1940). Adreso: *Caixa postal, 94, S. Sebastião do Paraíso, Minas Gerais.*

ESPERANTA ASOCIO DE RIO-GRANDE-DO-NORTE. (1940). Sidejo: *Rua Vigário Bartolomeu, n.º 587, Natal, Rio-Grande-do-Norte.*
— Adreso por korespondajo: *Av. Tavares de Lira, 105.*

GRUPO ESPERANTISTA DE LIMOEIRO. (1940). Adreso: *Caixa postal, 73, Limoeiro, Ceará.*

ESPERANTA INSTITUTO DE ASSIS. (1941). Adreso: *Rua Smith*

O ANUÁRIO DA LIGA ESPERANTISTA INTERNACIONAL

Já recebemos da Inglaterra o anuário 1941. Cuidadosamente impresso, em volume menor do que nos tempos normais, o anuário nos traz preciosas informações e demonstra a força de vontade e a perseverança dos esperantistas ingleses. Com tristeza notamos o desaparecimento de diversos países da lista dos delegados da Liga. São territórios assolados pela guerra e sem comunicações postais com os outros países. Por outro lado, notamos com prazer o crescimento da lista em relação ao Brasil e a Portugal.

Os territórios devastados pela guerra só temporariamente desaparecem do anuário. Mais cedo ou mais tarde serão restabelecidos os serviços postais, sejam quais forem os resultados da guerra.

Recebemos igualmente alguns jornais esperantistas da Suíça, da Inglaterra e da Suécia e notamos que os horrores da conflagração não abateram o ânimo forte dos propagandistas do esperanto no Velho Mundo. Funcionam cursos, realizam-se reuniões, imprimem-se livros e jornais e conserva-se fé inabalável no triunfo final da paz e da fraternidade.

Examinámos a conta de Lucros e Perdas da Liga e vimos que não houve déficit; ao contrário, houve um lucro de £ 8-13-4 (oito libras, treze shillings e quatro pence) em um total de despesas de £ 925-10-11. Esse perfeito equilíbrio econômico, quando a Liga perdeu com a guerra mais de metade dos sócios contribuintes, demonstra grande capacidade administrativa e o espírito de sacrifício dos servidores da causa esperantista.

(El "O Reformador")

ESPERANTO
Série Pedro II Coleção "B"
CADERNO CONTENDO

Gravuras e Vocabulários para o ensino do Esperanto pelo Método Direto
(Tradução do vocabulário por A. Couto Fernandes)

PREÇO 3\$000

Vasconcelos, 9, Assis, E. de São Paulo.

GRUPO ESPERANTISTA "HUMBERTO DE CAMPOS". (1940). Sidejo: *Rua Curitiba, 636, Belo Horizonte, Minas Gerais.*

MEDICINO KAJ ESPERANTO

"O Primeiro caso de Spruw Tropical no Brasil" (La unua kazo de Tropika Spruo en Brazilo). Apartaĵo de la Revuo ACTA MÉDICA — Sepa volume — N.º 6. Junio 1941. Rio de Janeiro. Verkita de D-ro Fernando Vaz de Figueiredo, kuracisto kaj dentisto. Assistanto de Klinikoj de Tropikaj kaj Infektaj Malsanoj ĉe la Hospitalo de Sankta Francisko de Asizo. Artikolo en portugala lingvo kun resumoj en angla, germana kaj esperanta lingvoj. Jen la komenco de la esperanta resumo: "La aŭtoro prezentas la unuan kazon de tropika spruw (spruo) aperintan en Brazilo. Li montras, ke la vorto sprue tutmonde uzata estas kriptajlo de la nederlanda vorto spruw probable uzata de Van der Burg por nomi tiun malsanon. Li citas la du unikajn kazojn de netropika spruw konstatitajn en Brazilo, unu en ŝtato Rio-Grande-do-Sul kaj la duan en São Paulo..."

El la "Esperanta Teknika Medicina Vortaro", de Doktoro Briquet (de Lille), kaj eldonita de INTERNACIA MEDICINA REVUO ni transskribas la jenon: "SPRUO, tropika malsano, kaŝitdevena (avitaminozo, parazito, infektajo aŭ mikozo (?); simptomoj: diareo, anemio, malfortiĝo, glosito."

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo
BRAZILIO

Ĉefdelegito: Antonio José Vaz, Rua Paraná 71, Rio de Janeiro.

Florianópolis. D: G. P. Faraco, Departamento Estadual de Estatística. FD (Statistiko, muziko, kaj katolikaj aferoj): La D.

Limoeiro. D: D-ro D. Lima Verde, Limoeiro, Ceará.

Niterói. FD (Statistiko kaj Katolikaj aferoj): D-ro M. Ritter Nunes, Rua General Osório 87 — casa 3.

Ouro Preto. D: G. Barbosa Mamede, Rua Nova 9.

Membro-subtenantoj — 1941

Inĝ. A. Couto Fernandes, Sroj A. Caetano Coutinho, Ismael Gomes Braga kaj Antonio José Vaz.

Brazila Ligo Esperantista

Aligis al B. L. E. s-roj José Maia dos Reis, e *Campo Formoso*. Baía, kaj John L. Gardella kaj f-ino Frances Smith, el *USONO*.

REVISTA BRASILEIRA DE GEOGRAFIA

(Brazila Geografia Revuo)

Direktoro: Inĝ. Cristovão Leite de Castro

Trimonata publikigaĵo kun resumo en Esperanto de la ĉefaj artikoloj. Eldonita de la *Nacia Konsilantaro de Geografio*, fako de la *Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko*.

Jam aperis dek numeroj.

Ciu numero: 6\$000 aŭ 5 poŝtaj respondkuponoj.

Jarabono: Unu dolaro kaj duono aŭ 20 poŝtaj respondkuponoj

Adreso: Avenida Augusto Severo, 4

RIO DE JANEIRO, BRASIL